

Svisa federismo, 4-a parto
Claude Gacond, 156-a radioprelego, 1966.10.05 & 1966.10.08

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la svisa federismo kaj la provo federi Eŭropon.

Post la napoleona epopeo la svisoj, kiel la ceteraj eŭropanoj, revenis al siaj kutimoj. La kantonj subskribis en aŭgusto 1815 novan pakton, kiu restarigis Ligon de suverenaj ŝtatoj.

A.- Tiu restarigo ne povis esti absoluta. La liberigitaj koloniaj teritorioj restis suverenaj kantonj. Multaj feodalaj kutimoj estis malaperintaj.

Cl.- Reveninte al Ligo de Ŝtatoj, la svisoj ekrimarkis la avantaĝojn de la antaŭa napoleona federacia konstitucio, kiu tamen funkciis bone malbone dum deko da jaroj.

A.- Ili meditis parolojn de Napoleono: « *La naturo igis vian ŝtaton federacio; voli venki la naturon ne estas ago de saĝulo.* »

Cl.- Tiu Napoleono ankoraŭ estis dirinta: « *Pripensu bone la gravecon havi proprajn trajtojn; estas ili, kiuj malhelpas vin tro simili al la ceteraj landoj kaj malebligas asimiliĝon.* »

A.- La mankoj de la nova reĝimo estis ĉefe ekonomiaj. Pro la interkantonaj doganoj la interkantonaj interŝanĝoj estis venenigitaj.

Cl.- Tiuj interŝanĝoj tuŝis kreskantan loĝantaron. Sub la napoleona reĝimo okazis la unuaj federalaj festoj. Ekzemple en 1805 okazis en Unsprunnen apud Interlaken la unua kongreso de alpaj bovistoj okaze de lukto-konkurso. Ekde tiam ĉiujare la alpaj paŝtistoj emis renkontiĝi por novaj luktadoj.

A.- En 1819 la studentoj fondis svisan asocion kaj ekorganizis interkantonajn kontaktojn.

Cl.- La samon faris la sciencistoj.

A.- Kaj en 1822 ankaŭ la oficiroj.

Cl.- En tiuj interkantonaj renkontiĝoj oni ripetis la famiĝintajn parolojn de la bazela historiisto **Henri Zschokke**: « *Fariĝas evidente, ke la granda plimulto de la nacio pli kaj pli disiĝas de la plimulto de la kantonaj registaroj en sia evoluo kaj siaj aspiroj. Dum la popolo emas pasie al unuiĝo de ĉiuj naciaj fortoj, la kantonaj registaroj sin reciproke forpuŝas kiel similaj polusoj por defendi siajn lokajn interesojn kaj sian sanktegan suverenecon.* »

A.- Fine en 1832 la Dieto decidiĝas ekstudi projekton de nova konstitucio federacia. Tiam aperas interesa homo, kiu fakte ne estas sviso. Li nomiĝas **Pellegrino Rossi**, kaj naskiĝis en **Carrare** (Italio). Politika rifuĝinto li fariĝas en Ĝenevo la unua katolika profesoro ĉe la Akademio **Calvin**.

Cl.- Lia elokventeco estas ŝatata de la ĝenevanoj. Pro tio li fariĝas ilia ambasadoro en la kunvenoj de la Dieto, kie li pledadas nelacigeble favore al starigo de federacia registaro, vivanta sintezo de unueco kaj diverseco.

A.- Eŭropo bezonus hodiaŭ similan elokventulon por defendi la tezojn de la eŭropaj federalistoj. Aŭskultu la dirojn de tiu **Pellegrino Rossi**. Vi tiam rimarkos ilian novan aktualecon, se anstataŭ la vorto Svislando oni pensas la vorton Eŭropo.

A.- « *Svislando,*

Cl.- Ni pensu nun *Eŭropo,*

Svisa federismo, 4-a parto
Claude Gacond, 156-a radioprelego, 1966.10.05 & 1966.10.08

A.- Eŭropo, tiu vorto staras super niaj diversecoj lingvaj, kutimaj, religiaj kaj industriaj ; tiu vorto, kun la irantaro de ideoj, kiuj ĝin akompanas, flugas super niaj lokaj tradicioj, aŭ pli taŭge dirite, sorbas ilin en sin mem. Nur ĝi povas esti por ni, en nia penso, la antitezon de la fremdeco. Estas ĝi, kiu impresas nin per neforigebla sigelo de komuna nacieco. [...] Jes, la ideo pri komuna patrio ne estas fremda por ni ; la sento pri tiu nacieco ekzistas en niaj koroj. Malgraŭ la asertoj de tiuj, kiuj ne komprenas nian modernan tempon, unu el la gloraj punktoj de nia epoko estas, ke tiu ideo akiris pli da neteco, ke tiu sento fariĝas pli energia. »

A.- Elokventeco ofte uzas bildojn ne tre klaraj. Pellegrino Rossi esprimis sentojn per vortoj, kiuj tuŝas pli la koron, ol la racion. Patriotismo, ĝi estu svisa aŭ eŭropa, estas fenomeno pli religia, ol scienca. Tiom longe, kiam scienculoj, kaj intelektuloj provis demonstri la neceson de federigo por la svisaj kantonoj, ilia alvoko restis seneŝa. Pellegrino Rossi uzas alian lingvon pli sentimentalan. Lia alvoko estas aŭdata. Lia kaŭzo venkis.

Cl.- Sed ne tuj. Pellegrino Rossi prezentis projekton de federacia konstitucio, kiu, kiel okazas ĝenerale en politiko, estis rifuzita. Oni riproĉis al tiu projekto tro respekti la kantonajn aŭtonomiojn kaj samtempe aliaj pensis, ke tiuj aŭtonomioj ne estis sufiĉe protektitaj.

A.- Sed pro la obstino de Pellegrino Rossi tiu projekto devis esti detale studita en laborkomisiono nomumita de la Dieto. Kiam subite en 1848 la svisoj devis redakti federacian konstitucion, tiam ili ĉerpis ĉefe el la propono de Pellegrino Rossi, kvankam tiu italo ne plu vivis en Svislando. Li estis en tiu jaro murdita en Romo. Li estis fariĝinta estro de la pontifika registaro sub Papo Pio la naŭa.

Cl.- La periodo inter la napoleona epopeo kaj la starigo de federacia organizaĵo kovras tridekon da jaroj. Ĝi vidis ŝanĝiĝi ne nur la kutimojn. Dank'al multaj civilaj konfliktoj : lokaj militoj, vilaĝaj ribeloj, klasaj luktoj, ekonomiaj bataloj, la kantonaj konstitucioj devis reformiĝi. Estis vere la finiĝo de la feoda epoko. Moderna Svislando povis naskiĝi.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon !

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-